# Viva domeno – socia ludo

| | |
|---|---|
| **Celo:** | grupigo – antaŭludo, aŭ ekzerco grupigi la lernantojn ekzercado de esprimoj kun „*ŝatas, havas, povas,* …” kaj „*ankaŭ mi*” |
| **Celgrupo**: | komencantoj |
| **Antaŭpreparo:** | nenia |
| **Tempo:** | 5 min. |
| **Nombro de ludantoj** | min. 8 (eblas grupigi la partoprenantojn ne nur en du, sed al 3, 4 eĉ en 5 grupojn) |

La ludgvidanto (instruisto) elektas 2 (3, 4, 5) homojn, kiuj estos la grupestroj.
Ili, unu post la alia anoncas ion pri si mem:

Ekz.: *Mi ŝatas glaciaĵon kun laktokremo.*
*Mi havas pli maljunan fraton.*
*Mi scipovas naĝi….*

Se iu el la partoprenantoj (lernantoj) havas la saman ŝaton, povon, diras: „*Ankaŭ mi ŝatas glaciaĵon kun laktokremo”, „Ankaŭ mi havas pli maljunan fraton”, Ankaŭ mi scipovas naĝi*”, kaj staras malantaŭ la grupestron. La grupestroj faras laŭvice po unu anoncon. Poste jam la novveninto anoncas ion pri si, ĝis la partoprenantoj „elĉerpiĝos”. Se iu – jam „grupigita” – diras ion, kiu trovas nenies plaĉon, li/ŝine diras novan frazon, sed sekvas alia persono, kaj tiel eblas, ke la nombroj de la grupoj ne memkompreneble estos la samaj.
Tiamaniere la partoprenantoj mem elektas, al kiu grupo ili deziras aparteni, ĉar eblas mensogeti…
(Al anonco „Mi ŝatas matematikon” iu rajtas diri „Ankaŭ mi ŝatas matematikon.” malgraŭ la malamego, se la persono deziras aparteni ĝuste al tiu grupeto.)

La ludo iom freŝigas, ankaŭ fizike la kursantojn (precipe plenkreskulojn, kiuj foje partoprenas vesperajn kursojn mortlacaj), ĝi bone efikas al grupa kohezio. Kaj la partoprenantoj mem povas elekti - ne ĉiam la instruisto - al kiu grupeto aparteni.